# *La Nacia Sepopo de Kubo prezentos 20 koncertojn en Usono.*



La ?enerala direktoro de la muzika ensemblo, Francisco Oropesa, komponisto kaj produktisto konata en la arta mondo kiel *El Matador*, esprimis ke la sepa turniro de la muzika ensemblo tra Usono okazos en oktobro kaj novembro  tra kelkaj scenejoj, inter ili la konata klubo nokta Conga Room, de Los Angeles.

Li esprimis al la informagentejo Prensa Latina, ke la grupo esperas da?re havi bonan akcepton de la usona publiko, kiel okazis ?is nun.

Por li, la muziko "estas bona okazo krei pontojn inter Kubo kaj Usono, kaj sendube ?i povas esti vojo de alproksimi?o; en la insulo ni pretas solvi  ?iujn situaciojn".

La nacia sepopo ?us prezentis sin anta? centoj da personoj en la koncertejo Lehman Center for The Performing Arts, en Bronx, kie ili  dividis la scenejon kun la orkestro Broadway.

La grupo estis fondita en 1927 de Ignacio Piñeiro kaj da?re celas porti tra la mondo la kuban tradician muzikon kaj reprezenti la insulon anta? la plej diversaj publikoj.

La sukceso de la grupo  rezultas el tiu agado depost kvar generacioj de muzikistoj, kiuj konservas la tradiciajn ?enrojn kiel soneo, bolero kaj aliaj kun la stilo kaj sono de la fondinto.

La Nacia Sepopo de Kubo reklamas nun sian estontan kompaktdiskon nomatan *La plej granda kaj universala*, de la sondiskeldonejo  Bis Music.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/81536-la-nacia-sepopo-de-kubo-prezentos-20-koncertojn-en-usono

**Radio Habana Cuba**